

# Eŭropa Bulteno

Januaro 2010, №1 (90)

## DELEGITARO DE EEU ĈE LA PREZIDANTO DE EŬROPA PARLAMENTO



Por festi la 150-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof, Margareta Hanzlik MEP aranĝis ke delegacio de EEU renkontu prezidanton de Eŭropa Parlamento Jerzy Buzek, eks-ĉefministron de Pollando (1997-2001) en la Eŭropa Parlamento en Bruselo la 13-an de januaro 2010. La kunveno daŭris dum 20 minutoj, kiel antaŭvidite. Ĉeestis Margareta Handzlik, MEP, Jozef Reinvart, vic-ambasadoro de la

slovaka ambasado en Belgio, kaj Seán Ó Riain, prezidanto de EEU. Kun la Prezidanto de EP estis konsilistino Astrid Worum. La Prezidanto miris ke du nepoloj parolas pole. Unue ni prezentis al li la sekvan materialon:

1. "La Arto labori kune", nova 901-paĝan Festlibron por la 70a naskiĝtago de profesoro Humphrey Tonkin. Estas kontribuoj de 106 homoj, kaj mi substrekis ke temas pri profesoro de angla literaturo kiu estis prezidanto de la Universitato de Hartford, Connecticut, Usono.
2. "Encyclopaedia of the Original Literature of Esperanto" de d-ro Geoffrey Sutton.
3. "La Zamenhofa Stato", de Roman Dobrzynski-Ludoviko Zaleski-Zamenhof (en la pola).
4. "Ĉio komenciĉis ĉe la Verda", dulingva (Esperanto-pola), riĉe-ilustrita libro pri la vivo de Zamenhof.
5. "Interkultura Dialogo kaj Komunikado" - la oklingva referaĵo de la EEU-konferenco de 2007 en Maribor.
6. La letero de Slovaka Vicĉefministro Ĉaplovic al siaj EU-kolegoj, kaj al la Eŭropa Komisiono, de marto 2007 proponanta inter-registaran diskutadon de eŭropa lingvopolitiko, kun la konkludoj de la bratislava konferenco de novembro 2006, kiu uzis Esperanton kiel unu el siaj kvar laborlingvoj.

7. La bjalistoka UK-libro de 2009.

8. La DVD de [E@I](#), "Esperanto estas ..."

9. Alia KD-materialo, kiel la KD pri Esperanto kiu disdoniĝis kun "Gazeta Wyborcza" en Pollando septembre 2008.

10. Dosieurujo kiun faris Margareta Handzlik de diversaj gravaj paĝoj: la rezolucio de la pola Sejmo de 12-a de junio 2008 okaze de la centjariĝo de UEA; la priskribo de Zlatko Tišljár de la EEU-konferenco en Hamburgo, "Kia estus Europano se neniam ekzistus EU?", planata por majo 2011, angligita de Seán Ó Riain; la invito de Profesoro Geremek al ĉiuj EP-anoj al diskuto pri Esperanto julie 2008 (lia lasta mesaĝo al ili antaŭ la mortiga akcidento); la Europa Himno, kun vortoj de Umberto Broccatelli, poligita de Georgo Handzlik. Prezidanto Buzek aparte zorge legis la polan tradukon, kaj komentis ĝin tre favore: li tute konsentis kun la enhavo, kaj admiris la stilon de la pola traduko.

La libroj, krom la tonkina, estas donaco de UEA. Mi mem donacis la tonkinan libron.

Ni faris du konkretajn petojn al la prezidanto Buzek: a) ke li fariĝu patrono de la hamburga EEU-konferenco de majo 2011 kaj ke li eble venu prelegi dum ĝi; b) ke li malfermu diskuton en la EP dum la jaro 2009 por honorigi alian grandan polon, Profesoron Bronislaw Geremek, kiu tragike mortis en akcidento la 13-an de julio 2008. La temo povus esti simila al la temo de 2008 ("Esperanto: amiko aŭ malamiko de plurlingveco"), ĉar temas pri nova Eŭropa Parlamento, Margareta Handzlik povus inviti siajn kolegojn kaj Prezidanto Buzek malfermus ĝin. La Prezidanto promesis favore konsideri ambaŭ petojn, kaj petis nin sendi formalan leteron al lia oficejo.

Margareta Handzlik mallonge kaj trafe prezentis niajn ideojn, aparte la ideojn de la letero de slovaka vicĉefministro Ĉaplovic. Jozef Reinvar t substreki la politikan aktualecon de ili, per ekzemploj el Slovakio, Hungario, Belgio, kpt. Mi mem substreki la lernfaciligajn ecojn de Esperanto, kaj parolis pri la Springboard-projekto en Britio. La Prezidanto montris grandan intereson, kaj ŝajne alte taksis nian realismon, t.e. la fakton ke ni ne postulis politike neblan kaj ke ni montris komprenemon de lia pozicio. Li ankaŭ alte taksis la fakton ke ni serĉas rolon por Esperanto en la kunteksto de plurlingva Eŭropo, kaj ke ni ne celas anstataŭi aliajn lingvojn per Esperanto.

Mi antaŭpreparis la kunvenon per tagmanĝo kun irlanda membro de la kabineto de prezidanto Buzek, Fearghas Ó Béarra, tagon antaŭe, kiu donis plurajn bonajn konsilojn. Aliaj avantaĝoj estas ke Margareta Handzlik estas el la sama partio, lando kaj eĉ regiono kiel la prezidanto Buzek, kaj ke ili bone kunlaboras; kaj ke la prezidanto, kiel sudpolo, bone komprenas la slovakajn lingvon de Jozef Reinvar, kiu mem bone komprenas la polan. Do, estis neniu lingva problemo dum la kunveno!

**Seán Ó Riain**

## **PROPONO DE EŬROPA ESPERANTO-UNIO KADRE DE PUBLIKA KONSULTADO PRI LA STRATEGIO DE EU ĜIS 2020**

La estraro de EEU interkonsentis pri teksto por EU-komisiono kadre de publika konsultado pri la strategio de EU por la nova jardeko 2010-2020. La suba teksto estis sendita al Eŭropa Komisiono en germana traduko de M. Tišljár:

Baze de la fakto ke la strategio antaŭvidas reformojn, kiuj ebligas eliri el la ekonomia krizo kaj tamen

- a) konservus eŭropajn valorojn inter kiuj estas specife gravaj solidareco kaj sociala sistemo
- b) kreas ekologie daŭropovan produktadon kaj influus pozitive al la mondaj ekologiaj problemoj
- c) solvus la demografian problemon de malkresko de novaj naskoj kaj kresko de kvanto da maljunuloj
- d) lasus Eŭropon malferma (kiel merkato de varoj kaj homfortoj kaj kiel akceptanto de potenciale novaj aliĝantaj landoj)
- e) iĝus gvidanta en la monda ekonomio eluzante la tutglobajn kaj teknologiajn evoluojn, kreante inteligentan kaj daŭropovan ekonomion baze de la tutviva lernado,

Ni konsideras pliajn tendencojn en la mondo (kiujn la nuna papero ne enhavas)

- a) la monda tensio kaj kreskanta malfido inter la tiel nomataj kristanisma kaj islama civilizoj
- b) la verŝajna demografia evoluo en EU en kiu jam post deko da jaroj en la landoj kun la plej granda nombro da islamanoj pli ol 50% de la loĝantaro estos islama (Belgio, Nederlando, baldaŭ poste ankaŭ Germanio, Francio kaj Britio...)

kaj PROPONAS aldoni la jenajn elementojn al la STRATEGIO de EU en la sekva jardeko:

1. Konfrontiĝi konscie kun la fakto ke EU fariĝos en 2020 komunaĵo kun signife granda kvanto da islamanoj kaj pro tio la strategio devas antaŭvidi

- a) edukadon de junaj generacioj pri tolero, interkultura dialogo kaj funkciado en novaj kondiĉoj
- b) konsciigadon de la tuta loĝantaro pri komuna EU-identeco baze de eŭropaj valoroj, kiun kaj la eŭropaj muzulmanoj kaj la alireligiuloj kaj la nereligianoj alproprigos same emocie kiel siajn naciajn identecojn. Ene de tiu Eŭropa identeco ĉiuj civitanoj vidu alikredantojn, alirasanojn kaj alinacianojn kiel riĉecon de Eŭropo (komprenu la sloganon »Unueco en diverseco« kiel io tre pozitiva kaj grava per kio EU diferenciĝas de aliaj en la mondo). Tio estas ebla, nur se en ĉiuj EU-landoj oni enkondukas en la

lernejoj EDUKADON PRI EŬROPA KONSCIO, edukadon por eŭropaj valoroj, kies grava parto estas ankaŭ eŭropaj simboloj.

2. Por atingi la ekonomiajn kaj ekologiajn celojn EU metu en sian strategion akcepti ĝis la jaro 2020 ankaŭ Turkion kiel sian membron.

a) Pro la klara plano akcepti Turkion dum sekvaj 10 jaroj eblus iom post iom prepari eŭropanojn por tiu grava ŝanĝo, ke EU ampleksos ankaŭ grandan landon kun islama kulturo kaj ankaŭ por la ŝanŝo kiu ja mem okazos en EU pro la demografia evoluo jam supre menciita

b) Per tio oni povos klare postuli ankaŭ de Turkio dum la dek jaroj enkonduki edukadon por eŭropaj valoroj kaj konscio kaj tiel prepari la turkan popolon por kompreni aliajn kiel io bona kaj por sincera toleremo (do malakrigi la islaman ekstremismon kiel ekz. okazis ĉe la bosniaj islamanoj),

c) Pro tio islamaj landoj najbaraj al Turkio kaj pli vaste vidos ke EU diferenciĝas de Usono kaj ne volas konfronton sed pacan evoluon de la mondo kaj tial ili preferos ekonomie kunlabori kaj kunevolui kun EU. Tio ebligos novajn investojn aparte en Levanta regiono kaj en Afriko kaj ebligos evoluigon de ekologie daŭropova ekonomio (ekz. konstruado de sunenergiaj centraloj en dezertoj...) kaj iom post ioma malgrandigado de la ekspluatado de nafto.

d) Tio ebligos al EU pli sukcese gajni grandan merkaton de islamaj landoj kaj prosperi ekonomie sed ankaŭ pro pli forta influo spirita de alia civiliza koncepto plijuniĝi kaj pozitive aliigi la ĝeneralan atmosferon en EU (pensu pri speciala kultura etoso kiun kreis la kulturkreatoj de Bosnio en kiu kuniĝis islama kaj kristana kulturoj, pensu pri turk-irana potencialo en filma kulturo, pri arabaj komercistaj kapabloj ktp...)

e) Tio ankaŭ grave kontribuas al malakrigo de la konflikto en Proksima Oriento kaj esence influas al la monda paco.

Klariga noto:

Por bone sukcesi en la tuta strategio necesas konscie atingi interkonsenton en EU pri nepreco evoluigi EU-an identecon per edukado en lernejoj kaj per publikaj medioj kaj per solvo de komunaj simboloj. La himno, blazono, flago, eŭro ktp jam ekzistas, sed la plej grava simbolo por ĉiu unuopulo pri lia sento de grupidenteco estas LINGVO. Oni kun fiero parolas sian dialekton kaj tiel daŭre montras sian lokan apartenon, oni kun fiero parolas sian nacian lingvon kaj tiel fiere montras sian nacian apartenon – oni devas havi ankaŭ sian eŭropan lingvon kiun oni kun fiero parolos montrante tiel sian eŭropan apartenon. Kaj tio ne povas esti iu ajn nacia lingvo, ĉar ĉiu el ili jam havas nacian simbolan funkcion. Tio devas esti neŭtrala lingvo aŭ elektita inter la mortaj lingvoj (kiujn oni revivigu) kiel la latina kaj malnovgreka aŭ inter la novlatinidaj planitaj lingvoj kiel Esperanto.

EU jam dum pli ol jardeko sisteme ne atentis du gravajn problemojn kaj daŭre prokrastas solvi ilin:

a) la kreskado de procento de islama loĝantaro ĉiam pli proksimiĝas al nombro kiam tiu parto de Eŭropanoj rilate sian religion kaj moralajn valorojn multe superkreskos la staton de sensignifa minoritato. Daŭre pretervidante tiun evoluon kaj restante konvinkitaj ke la aŭtoktona kulturo bazita je kristana historio havos ĉiam la rajton superregi aliajn, estas grava eraro kiu kondukas al ĉiam pli konflikta stato. Ĝi tre similas al la situacio en Kosovo. Tie la serboj neniam volis kredi ke la kresko de albana loĝantaro kaŭzos forpelson de serboj for de ilia historia bazo. Sen serioza konfrontiĝo kun la problemoj kaj la nura vera ebla solvo – kreo de nova komuna eŭropa vizio kun identeco tuteŭropa - kreskos unuflanke la ekstremismo islama, kiu postulos rajtojn por islamanoj kaj responde al tio ekstremismo kristana kiu klopodos defendi siajn »autoktonajn rajtojn«, kiel oni jam vidis en la svisa referendumo de 2009 kiu malpermesis la konstruadon de minaretoj ĉe moskeoj.

b) La neceso havi komunan identecan lingvon ĉiam pli akriĝadas, speciale ekde 2004 kiam envenis en Eŭropon novaj 12 oficialaj lingvoj. Kreskas la lingvo-komunika problemoj, kiu estas solvata per »nedecidita« enkonduko de la angla kiel praktikata laborlingvo. Tiu stato povas solvi la komunikan problemon de la instancoj, kaj por elito en la EU-landoj, sed ne por la plimulto de EU-civitanoj. Ĝi tute ne solvas la komunikan problemon de granda plimulto de la loĝantaro de EU malgraŭ tio ke la angla pli kaj pli forpelas el la lernejoj la lernadon de aliaj fremdlingvoj. Tiu stato ne nur ne solvas, sed eĉ esence ĉiam pli malfortigas la deziratan evoluigon de eŭropa identeco ĉe Eŭropanoj. La EU pli kaj pli perdas popularecon pro tio ke ĝi ŝajnas devigi ilin identiĝi kiel eŭropanoj per la angla lingvo, kion ili ne volas, ĉar tio privilegias 13% de civitanoj kiuj parolas angle denaske, kaj malprivilegias la restantajn 87%. Identiga lingvo povas esti nur neŭtrala kiun ĉiuj komprenos nur kiel eŭropan, kiun ili lernos apud sia nacia kaj regionaj lingvoj, ne komprenante ĝin kiel klopodon angligi aŭ usonigi EU-on.

EU preteratentas tiun problemon dum jardekoj kaj ne komprenas ke tio simile kiel la trudado de la rusa en Soverunio aŭ de la serba en Jugoslavio povus konduki al malŝato de la komuna EU kaj pretigos terenon por disfalo kiam politika, religia aŭ ekonomia krizo fortos.

**Zlatko Tišljarić**

## **FREŜA LISTO PRI LA STATO DE UNIVERSITATOJ EN KIUJ ONI INSTRUAS ESPERANTON**

El la raporto de sinjoro Germain Pirlot ni aperigas la enondukon kaj resumon. Detala raporto estas tro ampleksa por nia Bulteno, sed ĉiu povas elŝuti ĝin de la paĝaro [www.edukado.net](http://www.edukado.net)

### **ESPERANTO-KURSOJ OFICIALE ORGANIZATAJ EN UNIVERSITATOJ KAJ ALTINSTITUTOJ**

kompilinto: Germain PIRLOT, januaro 2010  
Steenbakkersstraat 21  
BE-8400 Oostende, Eŭropa Unio  
[gepir.apro.@pandora.be](mailto:gepir.apro.@pandora.be)



Antaŭparolo:

Jen mia 14-a kompilado de E-kursoj oficiale organizataj en universitatoj kaj altlernejoj; aldoniĝas sciigoj pri kelkaj kursoj en «Universitatoj por la tria aĝo».

Unue mi dankegas miajn informantojn, kiuj afable helpis en ĉi-tiu ĝisdatigado, eĉ se, kelkfoje, mi devis realvoki 3-, 4-, 5-foje!

Verŝajne mankas en tiu listo aliaj kursoj, pri kiuj mi nenion scias.

Mi esperas ke tiu dokumento iom helpos por pli-, plu-veki intereson pri Esperanto i.a. en universitataj medioj. Fakte la celo de tia kompilado estus helpi al ekriatoj, preferinde fakaj, inter tiuj universitatoj kaj altlernejoj, kie estas organizataj kursoj.

Mi ja esperas ke la ĉefa celo de tiaj kursoj ne estus nur varbi novajn zelotojn de Sankta Ludoviko!

Pro tio endus, laŭ mi, atente pripensi jenan sugeston de S-ro WU Guojiang, t.e. ĝemeliĝi superajn lernejojn kie estas E-kursoj, por plej diversaj celoj, ĉefe fakaj. Komiisito pri la projekto «Ĝemelaj urboj», S-ro WU jam plurjare bonege kunlaboras por kompiladi E-kursojn en Ĉinio.

Sukcesegon al tiuj kursoj!

\*\*\*\*\*

Nombro laŭlande : Brazilo : 5 - Bulgario : 1 - Ĉeĥio : 1 - Ĉinio : 15 - Germanio : 3 - Francio : 1 - Hispanio : 1 - Italio : 1 - Japanio : 4 - Kongo Dem.Resp. : 1 - Korea Resp. : 3 - Kostariko : 1 - Litovio : 2 - Meksiko : 1 - Nederlando : 1 - Pollando : 4 - Rusio : 4 - Slovenio : 1 - Svedio : 1 - Usono : 3 - Venezuelo : 2

• sume : 56 universitatoj en 21 landoj.



## ITALA ESPERANTO-KONGRESO APUD VENECIO

June (nur 100-jare), sune, kune Itala Esperanto-Kongreso ek de la 21-a de aŭgusto 2010 apud Venecio

Itala Esperanto-Federacio iĝas centjara. Jen kialo por partopreni ĝian kongreson kaj konstati kiom ĝi estas juna. Pri la suno ne estas problemo. Ĝi daŭre brilas super la strandoj inter Venecio kaj Triesto, kie oni kongresos. Precize en Lignano Sabbiadoro. La kuneco rezultas el la fakto, ke Kubo estas malproksima sed Venecio proksima. Pro seminario de Eŭropa Esperanto-Unio, multaj europaj esperantistoj jam antaŭanancis sian ĉeeston.

Konataj artistoj dancigos vin kaj la lokan publikon. Pensu pri Jomo aŭ pri Mikaelo Bronŝtejn. Kaŝe vi ankaŭ povus forŝteliĝi de la prelegoj kaj iri al la strando. Ni certe ne informos la prelegantojn.

Rigardu en <http://italakongreso.esperantoitalia.it/> kaj aliĝu senpripense.

Vi rajtas donaci ion al vi de tempo al tempo.

Pliaj informoj che [fei@esperanto.it](mailto:fei@esperanto.it).

### La LKK de la Itala kongreso de Esperanto

## MALOFTA LITERARURA EVENTO – APERIS TRADUKO DE ESPERANTA ORIGINALAĴO EN LA HISPANA LINGVO



Mi aĉetis kontraŭ 7 eŭroj, en Casa del Libro (ne en la ĉefa vendejo en Madrido, sed en iu proksima al la veturplaco\* Bilbao), la libron de Ferenc Szilágyi "La liberación del juez" en la hispana traduko.

Lau mi, Javier Guerrero atingis ion bonegan: unuafoje normala eldonejo eldonas dulingve E-beletraĵon, kaj ĝi distribuiĝas en normalaj librovendejoj. Cetere, la libron akompanas bona enkonduketo, kie li klarigas ke jam antaŭe onu hispanigis aliajn E-aĵojn (kaj li mencias Miguel Gutiérrez kaj min, sed mi jam intencis skribi ĉi favoran mesaĝon antaŭ ol mi legis tiun mención). Pri la kvalito de la traduko mi ankoraŭ ne povas opinii, ne leginte ĝin.

Mia opinie indus aperigi artikolon en Libera Folio, Esperanto, Boletín k.a.

### Jorge Camacho

## **E@I-INFORMAS**

### **SKRIBU ĈAPELITAJN LITEROJN SENTIME**

Antaŭ nelonge aperis nova versio de Esperanto Klavaro (EK). EK estas programo, kiu kapabligas vin tajpi Esperanto-literojn kun ĉapeletoj je ĉiuj Vindozaj programoj kiuj subtenas Unikodon: dokumento-redaktilo, retumilo, retpoŝtilo k.a. EK funkcias sub Vindozo 95/98/ME kaj Vindozo NT4/2000/XP/Vista. Sufiĉas do instali tiun ĉi programon en vian komputilon, kaj vi povas ĝui vian tajpadon, uzante la ĝustajn supersignojn.

EK permesas uzi prefiksajn kaj postfiksajn modifajn klavojn por enmeto de ĉapelitaj literoj, kaj ankaŭ atribui ĉapelitajn literojn rekte al certaj klavoj. Bildsimbolo de EK ĉiam rezidas en la sistema taskopleteto (angle: system tray), kaj vi povas aktivigi aŭ malaktivigi EK-on, klakinte sur ĝi per la maldekstra musbutono. Vi povas ankaŭ, klakinte per la dekstra musbutono, voki menuon, kiu ebligas voki la agordo-fenestron, voki helpon aŭ haltigi la programon.

La programo EK estas farita de Jurij Finkel (Ruslando). Detalajn priskribojn de la instalado kaj agordado vi trovos en la retejo de EK: [www.esperanto.mv.ru/Ek/index.html](http://www.esperanto.mv.ru/Ek/index.html)

#### **Agordo de EK**

Defaŭlte, literoj “c”, “g”, “h”, “j” kaj “s” sekvataj de “x” kaj de “h” estas aŭtomate anstataŭataj per ĉapelita versio. Vi do povas tajpi kiel ĝis nun, uzante x- aŭ h-sistemon, kaj la programo konvertas vian “ŝ” aŭ “sh” al “ŝ” kaj simile. Estas pluraj nomoj, kiuj komenciĝas per Ch (kiel Chantal); tial estas utile malaktivigi la h- anstataŭigon. Se vi volas aperigi x-on en teksto, sufiĉas tajpi ĝin dufoje. Vidu dekstre la agordo-ekranon.

#### **Cimoj**

Verkante tiun ĉi artikolon, ni konstatis problemeton uzante EK en Google Docs je Internet Explorer. Ne estis problemo pri retumilo Google Chrome aŭ pri Firefox — programo, kiu pro diversaj kialoj estas konsilinda.

#### **Uzi EK en ret-mesaĝoj**

Ofte esperantistoj plendas, ke ili ne povas uzi supersignojn en sia retpoŝta komunikado. Efektive, eblas uzi ilin, sed necesas konscii, ĉu via retkesto (aŭ la agordoj de provizanto de via retkesto) subtenas Unikodon. Jam multaj subtenas ĝin, por ebligi al homoj senprobleman komunikadon. Ekzemple, uzante retkeston ĉe gmail de Google ni ne spertis ajnan problemon pri supersignoj.

Ŝajne la plej konata granda “malamiko de supersignoj” en tiu ĉi kampo estas la firmao Yahoo— iel ĝi konstante sukcesas ignori tion, ke la mondo ne estas uniforma, kaj ĝi ne volas helpi al siaj klientoj. Se do vi kapablas akcepti ĉapelitajn literojn, rekomendindas ankaŭ ilia verkado — en la 21a jarcento indas altigi nivelon de nia lingvo ne nur enhance, sed ankaŭ teknike.

#### **Yves Nevelsteen kaj Peter Baláž**



## **LERNOLIBRO DE LA RUSA OBJEKTIVE PRI ESPERANTO**

En lernolibro pri rusa lingvo por la 10-a klaso (ĉ. 17-jaruloj) troviĝas temo pri artefaritaj lingvoj kaj du plenaj paĝoj estas dediĉitaj por Esperanto!

La prezento estas pozitiva: "plej sukcesa el artefaritaj lingvoj", "ĉiu nacio sentas ĝin iom konata, ruso - pri libera konstruo de frazo, franco - konataj radikoj, ... - sufiksa vortkonstruo, ktp."

Mi, leginte la artikolon, ne trovis erarojn en prezentado. Estas donita baza regulo: kiuj vortoj finiĝas je "o", kiuj je "a", ktp. Estas menciite, ke en Esperanto eldoniĝas centoj da ĵurnaloj kaj libroj. Ekzemple oni publikigas "Ho, mia kor!" kaj rusan tradukon de Boris Kolker.

Fine de la artikolo por diskutado oni proponas demandojn pri ideo de komuna neŭtrala lingvo kaj ĝia realiĝo (fiasko?) Kaj prove eĉ proponas konstrui kelkajn vortojn.

**Aleksej Kuznecov**

## **INTERŜANĜO DE SPERTOJ PRI ESPERANTO- INSTRUADO EN STAĜOJ**

La problemo de la departementa asocio Espéranto-Vendée <http://esperanto-vendee.asso-web.com/> pri instruado de Esperanto per tagaj aŭ vesperaj semajnkursoj estas verŝajne sama kaj tre ofta en la tuta mondo pro pli malpli samaj kialoj :

tro malgranda nombro da sufiĉe kvalifikitaj, spertaj kaj disponeblaj bonvolaj kursgvidantoj, geografia diseco de la lernemuloj, distanco kaj atingebleco de la kursloko nefavoraj por parto el ili, nebla interkonsento inter kursgvidantoj kaj ĉiuj lernemuloj pri tago kaj horaro, nemalofta rezigno, aŭ forlaso, pro unu aŭ du el tiuj motivoj.

Pro tio, jam de pluraj jaroj, grupeto de kvar kursgvidantoj de Espéranto-Vendée provis alian instruformulon per serio de ses staĝoj okazantaj unu sabaton monate, de novembro ĝis aprilo, t.e. unu tagon monate dum ses monatoj, principe la unuan sabaton de la monato se ne estas ĝeno pro festotago aŭ alia kialo. Kursoj komenciĝas je la 9a horo 30 kaj finiĝas je la 16a 30 kun unuhora tagmeza paŭzo por manĝi aŭ pikniki surloke. En ĉiu staĝo partoprenas du kursgvidantoj, kiuj dispartigas inter si la laboron.

Kvankam tiaj staĝoj jam okazis en aliaj lokoj ol La Roche-sur-Yon, oni fine preferis la ĉefurbon de la departemento, ĉar ĝi estas centra (tiun bonfaron, inter amaso da malbonfaroj, krimoj kaj abomenindaĵoj, ni ŝuldas al Napoleono la 1a ;-). Montriĝis ke tiu formulo havas diversajn avantaĝojn :

- la kalendaro estas facile planebla kaj memorigebla;
- la organizado ne kostas multe, precipe kiam eblas ricevi senpagan ĉambron;
- la organizado estas ne komplika, ĉar ne necesas prepari manĝojn (ĉiu alportas sian tagmanĝon, eĉ se nur sandviĉon) kaj plani tranoktadojn (ĉiu reiras hejmen aŭ laŭvole aliloken post la fino).
- homoj kiuj ne povus veni semajne en vesperaj kursoj povas pli facile liberiĝi dum unu plena sabato kaj rezervigi ses sabatojn sur sia agendo.
- interkonatiĝo de la lernantoj kaj kursgvidantoj estas pli facila, kaj sekve la etoso estas pli agrabla, foje ĝoja, pli favora al bona asimilado. Ĉiu staĝo havas fakte ian neantaŭvideblan sed interesan "kolektivitan personecon" aŭ "gruppersonecon" pri kiu valorus esplori.

Se la formulo interesas vin ie ajn en la mondo, ne hezitu ĝin alproprigi al vi, ĝin adapti, plibonigi, pliriĉigi, kaj... informi nin pri viaj propraj spertoj, proponi ideojn.

Koncerne informadon pri staĝoj, dum ne eblas anonci ĉiun semajnan kurson, male, anonco estas ebla unu fojon monate en la lokaj mediatoj (gazetaro, radio kaj televido). Jen ĉi poste la komuniko dissendita por anonci la duan staĝon (kun E-traduko poste) :...

Staĝo de praktiko de Esperanto, Interreto kaj Skajpo.

La dua Esperanto-staĝo el la serio de ses organizita fare de la asocio Espéranto-Vendée okazis sabaton, la 12an de decembro en La Roche-sur-Yon. Ĝi estis parte dediĉita al Interreto kaj la plej bona maniero uzi ĝin.

La posttagmezo estis rezervita al praktikado de Esperanto per senpaga telefonado per Skajpo, kun kontaktoj en Ĉilio, Meksikio kaj Italio. Tiu parto de la staĝo disvolviĝis en la regiona cifereca spaco de (antaŭe "Cybercentre"), en la kvartala domo de la Verda Valo.

Espéranto-Vendée estas kuraĝigita en tiu nova formulo de staĝoj pro la fakto ke la plej granda komunumo de lernado de lingvoj en la mondo, [Livemocha](http://livemocha.com), en Usono, ĵus aldonis Esperanton al la jam proponitaj lingvoj. La kresko de la eblecoj lerni Esperanton per Interreto ebligas tiel akiri bazajn konojn nepre necesajn por povi partopreni en tiuj staĝoj. Ili estas indikitaj en la rubriko "Comment l'apprendre ?" (Kiel ĝin lerni ?) ĉe <http://esperanto-vendee.asso-web.com>  
[espero.hm@wanadoo.fr](mailto:espero.hm@wanadoo.fr)

**Henri Masson**

## TRE INTERESA EVOLUADO EN LA ANGLALINGVA MONDO

- En decembro 2009, la usona retejo por senpaga lingvolernado "Livemocha" <http://www.livemocha.com/>, kiu havas 4 milionojn da membroj en la mondo, aldonis Esperanton al la 35 lingvoj, kiujn ĝi jam proponis.
  - La novjorka eldonejo Mondial <http://www.librejo.com/>, kiu okupas belan lokon inter la Esperanto-eldonistoj, publikigis referencan 740-paĝan enciklopedion de Geoffrey Sutton pri la originala literaturo en Esperanto: "Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto" <http://www.librejo.com/enciklopedio/index.html>. Principe en marto 2010, ĝi aperigos vortaron "ENGLISH-ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY" de profesoro [John C. Wells](#) (rabato ĝis la fino de februaro: <http://www.librejo.com/wells-vortaro/index.html>)
  - Sur la retejo "Ideas for Change in America" aperas propono de Renata Ventura, teksasa ĵurnalistino: "Obama, introduce Esperanto as a Second Language subject in schools" por enkonduko de Esperanto kiel dua lingvo en la usonaj lernejoj. Simila propono, antaŭ unu jaro, estis inter la 25 plej sukcesaj inter pluraj miloj, tiel ke UEA fariĝis ekde tiam partnero de [Change.org](#).
  - La omaĝo de Google al D-ro Zamenhof, okaze de la 150a datreveno de lia naskiĝo, la 15an de decembro 2009, havis vastan eĥon kaj plue havas sekvojn tra la mondo. Jam en video-reklamo por Gmail, Google simpatie aludis al Esperanto: <http://www.google.com/mail/help/fightspam/getstarted.html> (ĉirkaŭ la fino, ekde 1:55).
  - La programo "Springboard to... languages", kiu celas faciligon en lingvolernado per Esperanto kiel salttabulo, estas brita iniciato: <http://www.springboard2languages.org/home.htm>
  - Klopodo ekzistas ankaŭ en Aŭstralio por enkonduko de Esperanto en lernejoj kadre de LOTE (Language Other than English — Lingvo alia ol la angla): "The World of Primary Esperanto" (video: <http://www.youtube.com/watch?v=7H4hfuYvU4g> — samtitola pdf-dokumento ricevebla de mi laŭ simpla peto: 3,8 Mo — HM):
  - Plej laste, la granda londona firmao pri lingvolernmetodoj [Eurotalk](#) aldonis Esperanton inter 120 ĝis nun proponitaj. <http://eurotalk.com/en/store/learn/esperanto/talknow/cd> Ekzistas verŝajne pliaj menciindaj iniciatoj el la anglalingva mondo favore al Esperanto. Antaŭdankon pro atentigo pri ili!
- Ni ne forgesu tiujn ĉi vortojn de [Lord Robert Cecil](#), brita delegito, kiu, en 1922, admonis la Komisionon de Intelekta Kooperado de la Ligo de Nacioj "memori, ke helpa mondlingvo ne estas beonata nur de la intelektuloj, sed antaŭ ĉio de la popoloj mem", tio en la momento kiam la franca registaro obstineme strebis sufoki proponon favore al la instruado de Esperanto en ĉiuj lernejoj de la mondo. La landoj, kiuj iniciatis tiun proponon, en septembro 1921, estis: Albanio, Belgio, Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Ĉinio, Hindio, Japanio, Kolombio, Perseo (Irano), Rumanio, Sudafriko kaj Venezuelo.

**Henri Masson**

## **KOMISIONO POR VIGLIGO DE LA LANDAJ ASOCIOJ DE EEU**

Dum la asemblea kunsido de EEU en Herzberg pasintjare ĝi decidis starigi Komisionon por vigligo de la Landaj asocioj en EU sed daŭris duonjaron por fine havi konsenton de ĉiuj kandidatoj. Nun ni havas la kompletan liston kaj sciigas la legantaron ke formiĝis la komisiono jenkonsista:

Ileana Schroeder: DK, SE, FI, EE, LV, LT

Renato Corsetti: IT, BG, MT, GR, Cipro

Jose Manuel Gaspar Martins: PT, ES

Stanislaw Mandrak: PL, CZ, SK

Ludoviko Molnar: Hu, Ro, Si, AT

Sean O Riain: GB, IRL

Aleks Kadar: Fr, DE, NL, BE, Lux

Proksimuma taskaro de la komisiono

1. Anigi Rumanion, Bulgarion kaj Estonion oficiale al EEU
2. Fortigi landajn asociojn, kiuj apenaŭ donas signojn de la vivo: Grekio, Portugalio,
3. Helpi plivigli la asociojn kiel la ĉehan, slovakon, slovenon, svedan...
4. provi iniciati starigon de iu ajn E-agado en Cipro
5. Stimuli ĉiujn landajn asociojn pri minimume jenaj aktivadoj:
  - a) klopodi fortigi aŭ starigi iun ajn junularan E-agadon
  - b) organizi landan renkontiĝon aŭ kongreson almenaŭ ĉiun duan jaron
  - c) subteni kaj realigi minimuman agadon okaze de lingvaj tagoj (Tago de partinlingvoj en februaro kaj Eŭropa lingva tago en septembro)
  - d) Ellabori propran programon pri agado kiel porcivitanaj eŭropaj organizoj kaj prezenti projektojn por tiusenca financado kadre de EU-fondaĵoj kaj ŝtataj fondaĵoj kaj ministerioj zorgantaj pri civitanaj organizoj - aparte tiuj kiuj agas por fortigi konscion pri EU.

**Zlatko Tišljar**

## **SOLENA ASEMBLEO DE E-SOCIETO EN MARIBOR EN LA 100-JARO**

La 18-an de januaro 2010 okazis en hotelo Piramida en Maribor (Slovenio) solena asemblea kunsido de la E-societo kiel unua aranĝo en la jubilea jaro. Nome la societo estis fondita en 1910 kaj festas ĉi-jare sian 100-an datrevenon. La societon fondis advokato Henrik Haas kaj estis ĝia prezidanto ĝis sia morto en 1925. Lia edzino Priska estis unu el la plej gravaj esperantistoj eĉ ĝis la 70-aj jaroj kiel organizanto kaj kursgvidanto. Ilia filino Herta ankoraŭ nun vivanta en Beograd estis dua edzino de jugoslavia prezidanto Tito, kiu mem lernis Esperanton en Maribor en la tridekaj jaroj kiam li estis en prizono. La fondo de la societo okazis en restoracio Senica la 13-an de septembro 1910 tre proksime de la nun okazinta jubilea kunsido (hotelo Piramida). Dum la longa historio la societo estis ĉiam aktiva krom dum la 2-a mondmilito kaj organizis aron da internaciaj aranĝoj (ILEI, IFEF, SAT kaj EEU-kongresoj), konferencoj de edukministerioj de mezeŭropaj landoj por enkonduki E-on en lernejojn, jugoslava kongreso, REF, aro da fakaj kunvenoj kaj simpozioj... Ĝi mem eldonis plurajn librojn sed aparte gravan eldonan agadon plenumis entrepreno Inter-kulturo kiu aktivis kunlabore kun la societo de 1991. Inter-kulturo eldonis pli ol 30 librojn inter kiuj 60% en Esperanto.

Dum la jubileo ĉeestis trideko da societanoj kaj tri gastoj: Carles Verduga el Katalunio, Neven Kovačić el Kroatio kaj Spomenka Štimec, sekretario de Kroatia Esperanto-Ligo, kiu prelegis pri la unua slovena esperantisto Egon Mosche, kiu esperantistiĝis en 1884 en Osijek (Kroatio) kiel oficiro de aŭstro-hungara armeo. Lia nomo estis trovita en la 17-a adresaro de Zamenhof. Ŝi rakontis ankaŭ pri Herta Haas kaj ŝia vivo kun Tito.

Post la oficialaĵoj en kiuj oni akceptis la programon por la jubilea jaro, en kiu oni aperigos libreton pri la 30 lastaj jaroj de la societa historio (la unuaj 70 jaroj estas priskribitaj en la libro "Sedek jaroj de la E-movado en Maribor" de Ivan Bratoš), fotoekspozicio pri la plej gravaj esperatistoj kaj aranĝoj dum la 100 jaroj kaj Lingva festivalo dum Festivalo Lent juni-julie.

La kunveno havis signifan publikmedian eĥon: Slovena televido faris multan filmadon (intervjuis la prezidantinon Melita Cimerman, min kaj Vesna Obradović, Radio Maribor same faris du intervjuojn kaj la ĉefa tagĵurnalo Večer aperigis artikolon kun foto. Ankaŭ la slovena informagentejo STA sendis informon pri tio al ĉiuj slovenaj medioj.

**Zlatko Tišljarić**

## **KONTRIBUO AL LA REKOMENDOJ PRI MULTLINGVISMO KIUJN PREPARAS EŬROPA KOMISIONO**

Karaj eŭropaj esperantistoj!

Nome de EEU Seán Ó Riain kaj mi kunlaboras en la platformo de organizoj por promocio multlingvismon fondita de Eŭropa Komisiono. La unua celo kiun starigis la Komisiono estas prepari dokumeton kun rekomendoj por la Komisiono pli malpli ĝis oktobro 2010. Seán kaj mi laboras en du diversaj laborgrupoj. Mia laborgrupo okupiĝas pri la subtemo lingva diverseco kaj socia inkluziveco. La grupo ellaboris enketon por diversaj lokaj, regionaj aŭ landaj asocioj per kiu ni ŝatus kolekti laŭeble multajn opiniojn pri la temo.

Mi do petas ke vi respondu al la demandoj nome de iu ajn asocio aŭ loka klubo al kiu vi apartenas. Krome se vi konas iun asocion en via regiono kiu okupiĝas speciale pri enmigrintoj aŭ iu alia formo de socia inkluzivigo (ne esperantaj asocioj kompreneble ankaŭ) mi petus vin, plusendi la enketon ankaŭ al ili kaj peti ke ili respondu ĝin. Mi sendas la esperantan tradukon de la enketo kaj la anglan version. Mi petas ĉiujn kiuj kapablas sen troa peno respondi angle, fari tiel por malpliigi mian traduklaboron. Kompreneble se vi plusendas al lokaj asocioj, la angla versio estas pli utila. Se iu bezonus allingvajn versiojn, mi petas kontaktu min: mi verŝajne povas havigi la hispanan tradukon, eventuale la francan kaj eble aperos ankoraŭ iuj aliaj preparitaj de kunlaborantaj eŭroponivelaj asocioj.

**Maja Tišljár**

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 5-an de februaro 2010.

Redaktorino: Vesna Obradović.

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljár, Maja Tišljár, Seán Ó Riain, Henri Masson, Aleksej Kuznecov, Yves Nevelsteen kaj Peter Baláž, Germain Pirlot, Jorge Camacho, La LKK de la Itala Kongreso de Esperanto, Vesna Obradović

Kontakto: [vesna.obradovic@gmail.com](mailto:vesna.obradovic@gmail.com)

Retpaĝo: <http://www.lingvo.org>, [www.eŭropo.eŭ](http://www.eŭropo.eŭ)